B Föreningsbrev

Föreningens lokal är öppen varje tisdag 18.00–19.00; vid månadsmöten till 21.00. I lokalen hålls nu kurser tre kvällar i veckan (mån, ons, tors), och på dagtid på onsdagar (kl. 11–13.15). Esperanto-Centro de Gotenburgo har bl.a. ett välförsett tidningarkiv och flera boksamlingar. Välkommen! Vägbeskrivning finns på föreningens webbsida.

La klubejo estas malferma ĉiun mardon 18.00–19.00; je monataj renkontiĝoj ĝis la 21a. En la ejo okazas kursoj dum tri vesperoj po semajno (lunde, merkrede, ĵaŭde), kaj tage dum merkredoj (11.00–13.15). Esperanto-Centro de Gotenburgo havas i.a. bone provizitan gazetan arkivon kaj plurajn librokolektojn. Bonvenon!

÷ ÷ ÷

Nya texter, annonser och upplysningar för inter-LIGILO nr 4:00 bör vara redaktörerna tilllhanda senast tisdag 28 november. Arbetsgruppen för *inter-LIGILO* träffas detta datum kl. 18. / **Novaj tekstoj kaj anoncoj** por *inter-LIGILO* N-ro 4:00 estu ĉe la redaktantoj marde la 28-an de novembro. La laborgrupo renkontiĝos la saman daton je la h.18.

÷ ÷ ÷

Membrogazeto de la Esperanto-Societo de Gotenburgo,

inter-LIGILO.

Ne-membroj povas aboni ĝin kontraŭ 40 kronoj. Retpoŝta versio senpaga.
Skribu sur la poŝtĝira talono: "Por la inter-LIGILO".

Responda eldonanto: Christer Lörnemark, tfn 031-41 26 53
Redaktantoj: Christer Lörnemark, Andreas Nordström, Inga Johanson, Göran Zachrisson

Esperanto-Centro de Gotenburgo
Masthuggsliden 1, **Se – 413 18 Göteborg**
Tfn 031-12 05 94 Poŝtĝira konto: 4 36 12-1
retpaĝo: <http://hem.fyristorg.com/chlo/societo.html>

PENNON AB Göteborg 2000

N-ro 3: 00

inter-LIGILO

Esperanto

Kongresaj eĥoj / Kongressekon

Britta Rehm berättar om årets KELI-kongress i Tjeckien
Britta Rehm rakontos pri la ĉi-jara KELI-kongreso en Ĉeĥio.

tisdag / marde
24 oktobro 19.00
en Esperanto-Centro de Gotenburgo,
Masthuggsliden 1

Kaffe m.m. / Kafo k.a.

Ta gärna med er foton och annat om ni gjort någon esperantoresa under året (tidigare resor går också an).

Bv kunporti fotojn k.a. se vi vojaĝis Esperante dum la jaro (aŭ antaŭaj jaroj)

Välkomna! / Bonvenon!

Världskongressen i Göteborg 2003
Det blir en esperantisk världskongress i Göteborg år 2003. Detta beslutade UEA:s styrelse under årets världskongress i Tel-Aviv. Göteborg var länge den enda kandidatstaden för 2003, men på sluttampen kom en inbjudan också från Lissabon. (Tel-Aviv-kongressen kan man läsa om i det senaste och det kommande numret av *La Espero.*)

Det planerade kongressdatumet för 2003 är 26 juli–2 augusti, och kongressen hålls på Svenska Mässan.

Nu börjar ett intressant projekt, nämligen att organisera kongressen. Esperantister från hela landet kommer att delta i det arbetet, och ett första steg tas redan lördag 21 oktober 12.00–15.00, då vi har ett arbetsmöte om kongressen i klubblokalen. Styrelseledamöter i SEF kommer att vara med på mötet. Alla som vill arbeta med kongressen är välkomna.

Christer Lörnemark

*

UK en Gotenburgo 2003
Estos Universala Kongreso en Gotenburgo en 2003. Tion decidis la estraro de UEA dum la ĉi-jara UK en Tel-Avivo. Gotenburgo estis longe la sola kandidata urbo por 2003, sed fine venis invito ankaŭ de Lisabono. (Oni povas legi pri la Tel-Aviva kongreso en la lasta kaj venonta numeroj de *La Espero.*)

La planita kongresdato por 2003 estas 26 julio–2 aŭgusto, kaj la kongresejo estos Svenska Mässan.

Nun komencas interesa projekto, nome la organizado de la kongreso. Esperantistoj de la tuta lando partoprenos en tiu laboro, kaj unua paŝo estos prenita sabate la 21-an de oktobro 12.00–15.00, kiam okazos labora renkontiĝo en la klubejo. Ĉeestos estraranoj de SEF. Ĉiuj kiuj volas labori por la kongreso estas bonvenaj.

Christer Lörnemark

*

Vojaĝo al IJK en Hongkongo
Merkrede la 25-an de septembro Magnus Asplund, studento ĉe Chalmers, prelegis pri sia vojaĝo ĉisomere al la Internacia Junulara Kongreso en Hongkongo. Li iris per trajno tra Germanio, Pollando, Bjelorusio kaj Rusio. Ekde Berlino li vojaĝis kun pli ol dek esperantistoj al IJK. Ili pasigis kelkan tempon en Esperanto-kongreso ekster Tobolsk, ĉe la rivero Ob. La klimato tute ne estis malvarma, ĝi similis al la sveda (supozeble kun malpli da pluvo).

Magnus Asplund rakontis ankaŭ pri malfacilaĵoj dum la vojaĝo. Ekzemple estis konsentite ke loka esperantisto en Moskvo aĉetu por ili la trajnbiletojn al Siberio. Kaj ĉe trajnstacio en Moskvo ja estis aro da afablaj moskvaj esperantistoj, sed ne ĉeestis la ulo kiu donus al ili la trajnbiletojn; ankaŭ neĉeestis la mono donita al li. Ili devis mem havigi al si la biletojn.

En la trajno ili manĝis plejparte supon kaj manĝaĵojn kiujn ili aĉetis ĉe trajnstacioj. La trajno haltis ĉe stacio nur ĉirkaŭ dudek minutojn, kaj la trajnoj ne reekis laŭ la sveda maniero, kun konduktoro signalanta per flago. Ne, la trajno nur ekveturis, kaj estis avantaĝo se oni estis en ĝi kaj ne sur la kajo... Ĝuste tia afero okazis ĉe iu siberia trajnstacio. Du el la kunvojaĝantoj deiris de la trajno, kaj post kelka tempo ili vidis trajnon ekforiri. Lastsekunde ili sukcesis suriri la trajnon. Sed la trajno iris en alia direkto nun – ne tiel strange, ĉar ili estis prenintaj la malĝustan trajnon. Nu, tio iel solviĝis, kaj la du perditoj revenis en la grupon.

En Siberio relative proksime al Bajkala Lago ili veturis al flughaveno kaj flugis en Ĉinion. (Denove estis problemo je ulo kiu aĉetus flugbiletojn al ili, sed ankaŭ tiu problemo solviĝis.) La aviadilo alteriĝis en Ŝenjang en nordorienta Ĉinio, kaj de tiu urbego ili veturis tra Ĉinio al Hongkongo.

Magnus Asplund ankaŭ rakontis multe da aliaj aferoj, ekzemple pri la IJK. Li ne estis sperta E-parolanto kiam li komencis la vojaĝon, sed lia Esperanto pliboniĝis, ĉar ĝi estis preskaŭ la sola lingvo uzata dum la vojaĝo: la kunvojaĝantoj interparolis nur Esperante, kaj ne multis la rusoj, ĉinoj kaj hongkonganoj kiuj povis paroli la anglan aŭ aliajn fremdlingvojn. (Eĉ en Hongkongo estis malfacile trovi anglalingvanojn, malgraŭ ke la angla estas unu el la oficialaj lingvoj de Hongkongo.)

(La dato de la prelego fiksiĝis mallonge antaŭe, kaj voko al la renkontiĝo okazis per *Rapida Informilo.*)

Magnus prelegis en la sveda, kaj la saman prelegon oni povus okazigi ankaŭ en alia medio, ekzemple junularasocio, kiel inspirilo por lerni Esperanton kaj vojaĝi en Esperantio.

Christer Lörnemark

*

Esperanto-kursoj en Gotenburgo

Nybörjare / Komencantoj
Onsdagar / Merkrede 18.30-20.00
Lärare / Instruisto: Ali Khoshmashraban
Började i vecka 38. / Komencis en semajno 38.

Nybörjare / Komencantoj
Torsdagar / Ĵaŭde 18.00-19.30
Lärare / Instruisto: Christer Lörnemark
Började i vecka 38. /Komencis en semajno 38.

Fortsättningskurs / Daŭriga kurso
Måndagar / Lunde 18.00-19.30
Lärare / Instruisto: Inga Johanson
Började i vecka 37. / Komencis en semajno 37.

Konversation / Konversacio
Onsdagar / Merkrede 11.00-13.30
Lärare / Instruisto: Aira Kankkunen
Började i vecka 37. / Komencis en semajno 37

Kurslokal / Kursejo:
Esperanto-Centro de Gotenburgo, Masthuggsliden 1, tfn 12 05 94
Avgift: Ca 100 SEK inkl. mtrl / Kotizo: ĉ

100 SEK inkluzive lernilojn.

Nybörjarkurs i Lerum

Nybörjare / Komencantoj
Onsdagar / Merkrede 18.30-20.00
Lärare / Instruisto: Inga Johanson
Började i vecka 39. / Komencis en semajno 39.
Kurslokal / Kursejo:
Lerums Skolbibliotek.
Anmälan / Aliĝo tfn 0302-158 58.

*

Esperanto-kurso en gimnazio en Lerum

Ĉe Lerums Gymnasieskola nun okazas Esperanto-kurso kun ok studantoj. La instruisto kaj iniciatinto estas Folke Wedlin, kiu memlernis Esperanton en 1999. La kurso ampleksas 100 gimnaziajn poentojn kaj daŭros ankaŭ dum la printempo.

La kolegoj de Folke ĉe la gimnazio akceptis la novan studfakon bonvole kaj kun intereso; kelkaj el ili eĉ ŝatus lerni Esperanton.

Do nun okazas Esperanto-kursoj ĉe du svedaj gimnazioj: en Lerum, kaj ĉe Katedralskolan en Uppsala. (Ĉe Olympiagymnasiet en Helsingborg okazis Esperanto-kursoj antaŭe, sed ne ĉi-semestre. Espereble la Esperanto-kursoj revenos en Helsingborgo aŭtune 2001.)

Christer Lörnemark

*

Esperanto-lernolibro por la gimnazioj

Ja eblas studi Esperanton ĉe kelkaj svedaj gimnazioj, kaj aliaj gimnazioj eble sekvos. Specifa lernilo estas bezonata por tiu grupo de lernantoj: moderna lernolibro kun profesia aspekto, eroj de junulara kulturo kaj kun interaktivaj ekzercoj sur komputila kompaktdisko. De kelka tempo Lars Forsman, Christer Lörnemark, Kjell Randehed kaj Folke Wedlin verkas tian lernolibron. *Esperanto por gimnazianoj* estas ĝia provizora titolo.

Christer Lörnemark

*

Sommarkursen i Gunnilse

Under några varma och vackra sommardagar 3-7 juli hölls en esperantokurs för nybörjare i Gunnilse nordost om Göteborgs centrum. Göteborgs Esperantoförening hade hyrt lokaler i Gunnilse missionskyrka där man kunde ha två studiegrupper, en nybörjargrupp för vuxna och en för barn. Den vŭna gruppen bestod av fem elever och hade Ali Khoshmashraban och Andreas Nordström som lärare. Barngruppen samlade sex barn och leddes av Siv Burell, Margareta Andersson och Helfrid Karlsson. Kursen bjöd på varierande aktiviteter. Förutom vanliga lektioner var det sång och lekar (den vuxna gruppen var med ibland) och visning av två videor: Mazi en Gondolando och en dockteaterfilm om Zamenhofs liv. Barnen utarbetade under veckan en liten föreställning, som de framförde på avslutningsdagen. De gjorde också en badutflykt till en närbelägen sjö. På det hela taget en trevlig och avslappnad kursvecka på den sommarfagra landsbygden.

Andreas Nordström

*

Somerkurso en Gunnilse

Dum kelkaj varmaj kaj belaj somertagoj 3-7 julio la gotenburga Esperanto-klubo aranĝis Esperanto-kurson en Gunnilse, nordoriente de la centro de Gotenburgo. La klubo luis lokalojn en la misifederacia kapelo de Gunnilse, kie oni povis havi du studrondojn, unu komenculan por plenkreskuloj kaj unu por infanoj. La plenkreskula grupo konsistis el kvin lernantoj kaj havis Ali Khoshmashraban kaj Andreas Nordström kiel gvidantojn. La infana grupo kolektis ses infanojn kaj estis gvidata de Siv Burell, Margareta Andersson kaj Helfrid Karlsson. La kurso ofertis diversajn aktivadojn. Krom ordinaraj lecionoj okazis kantado kaj ludado (la plenkreskula grupo foje partoprenis) kaj montrado de du videofilmoj: Mazi en Gondolando kaj pupteatra filmo pri la vivo de Zamenhof. La infanoj ellaboris dum la semajno etan prezentadon, kiun ili prezentis en la lasta tago. Ili faris ankaŭ banekskurson al proksima lago. Entute agrabla kaj malstreĉita kurssemajno en la somerbela kamparo.

Andreas Nordström

*

Vespera kurso en Masthugget

Samtempe kun la kurso en Gunnilse (3–7 julio) ankaŭ okazis vespera kurso en la klubejo, kun ok lernantoj. Instruis Inga Johanson kaj Christer Lörnemark, kaj Siv Burell kantigis la ĉeestantojn je esperantlingvaj kantoj.

Christer

*

Vagemulino vizitis

7–9 julio vizitis Gotenburgon Amanda Higley, juna esperantistino el Sacramento, Kalifornio. De aprilo 1999 ŝi vojaĝis en Eŭropo per Pasporta Servo, kaj tiel konatiĝis kun kelkcent Esperanto-parolantoj en diversaj landoj, ekzemple Francio, Germanio, Svisio kaj Hungario. Danion kaj Svedion ŝi trapasis survoje al la Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinki.

Amanda Higley skribis pri sia vojaĝado dum 1999, kaj la dokumenton oni trovas en Interreto ĉe <http://home.wxs.nl/~lide/ps/ps_aventuro1999.htm>. Espereble ŝi baldaŭ enmetos ĝisdatigon pri la jaro 2000.

Christer

*

Göteborgs Stadsbibliotek har ca 800 boktitlar på och om esperanto.
Låna och läs!
La urba biblioteko de Gotenburgo havas ĉ. 800 librotitolojn en kaj pri Esperanto. Pruntu librojn kaj legu!